GISTO - JAN-2004.
G.O. *Vaske*
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS

Legajxo senpage disdonata dum la Verda Kafo
Lau ttt-kongrua skribo.

BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Tra la tuta Brazilo aktivaj gesamideanoj pintigas siajn orelojn al POA, scivolaj pri la preparlaboroj cele gastigi la BKE. Almenau la vizitantoj de la e-reto nenion trovis, gxis nun en 2004. Tia tombeja silento zorgigas, tial mi ofte rememorigos la sxuldon de GEA al la brazila E-movado.

EKOLINK

Lastatempe mi ne sukcesas uzi PALTALK. Mia komputilo, de 1998, versxajne farigxis eksmoda...hi...hi. Lau EKOLINK, mi malofte sukcesas trovi radiokompanojn. Hierau, 25/1, ni havis belan kontakton pere de Brasilja, Eni=PT2CA, al nia valora aktivulo Lenio en Londono.Cheestis ankau nia amiko Hektor (Chilio). Lia signalo resendita de Eni estis, malgrau iom da ehho, tre bona. Mia vocho sendita al li, pere de Braziljo, estis ankau klare audebla en Londono. Lenio povis longe paroli kaj inter aliaj aferoj li anoncis sian venontan viziton al Brazilo en la venonta Majo. – Komputilistoj, farigxu radioamatoroj, por gxui tre plezurigajn QSO=komunikadojn per EKOLINK!

JARLIBRO 2003

Gxis nun gxi ne atingis mian adreson, malgrau ke mi plendis Che UEA. Iu tie dejxoranta stabano promesis al mi sendi duan sed jam forpasis pli ol du monatoj sed gxi versxajne ankau devojigxis...chu okazas sabotajxo? – Al nia chefdelegito, James Píton, mi informis la perdon. Nun mi atendas, ke al li eblos trovi kaj sendi ekzempleron al mi, li afable respondis.

BEKO

En la e-reto nia diligenta Leycester (Kasxias) plendas, ke tro pokaj katolikoj manifestigxas, ke tio gravas por ke tiu organizajxo ricevu atenton kaj agnoskon de superaj instancoj de la Katolika Eklezio. Legantoj estas petataj varbi katolikojn, ech ne-esperantistajn, por ke ili helpu multnombrigi BEKOn. Ne forgesu ke, el 80% de la katolikoj en Brazilo, nur et-eta kvanto frekventas nian verdan trancheon. BV helpi nian aktivulon Leycester.

EKOLOGIO

Chiuj estajxoj en la mondo formas katenon kun dependeco unu de la ceteraj. Ni chiuj sxuldas atenton kaj agojn kiuj favoras la naturon. Somero...plagxo memorigas ke oni avertu malatentajn homojn, ke plastaj restajxoj, mansakoj, chefe travideblaj, en marakvo, por fisxoj aspektas kiel predoj kaj estas englutataj. Ne-digesteblaj, ili terure malsanigas la bestojn... mortigas. – Arbaroj malaperadas kaj mamuloj,birdoj, serpentoj, dazipoj,erinacoj, perdas siajn logxejojn, tial ili ofte vagas enurben. Bonkoruloj helpu ilin retrovi vojon en arbaron. Venenajn serpentojn oni fermu ie, avertu la fajrobrigadon kaj ke gxi irigu ilin al Butantan. NE-venenan serpenton malfacilas kapti sed venenan, facilas. Chi lastaj ne facile fugxas tial, per stango (prefere kun hoko) 1,50m longa oni facile levas la besteton kaj metas gxin en keston gxis venos la brigadanoj.

KULTURO

En preparo, por la Kongreso, mi esperas ke pluraj gauchaj gesamideanoj jam diligente studas, por parkerigi tekston prozan au poezian, se ne kanton au teatrajxon. Gauchoj ne rajtas fusxe prezenti sian arton tradician au modernan al vizitantoj!

RUZA VENKO

Tri vendistoj, A, B kaj C vendas saman varon, kun enirejoj unu apud la aliaj. La vendisto-A elmetas grandan anonctabulon, proponante sian bonan varon al preterpasantoj; - Vendisto-B superas sian najbaran konkuranton per enorme granda anonco; - La tria pretigis kaj elmetis malgrandan, okulfrapan afisxon kun la ununura vorteto ENIREJO. – Meze de tiom multaj lingvolernejoj en la chefurbo, mankas verdulo kiu eluzu la ruzan artifikon de la tria vendisto kaj metu gxin che la GEA-enirejo kun aldonajxo: la plej facila!

DANKON

Meritas mian koran dankon, la tre karaj ge-Zaghettoj kaj la junulino Nitha pro plezuro kauzita al mi per alsendo de klaraj kaj tre oportunaj fotoj memore al la Z-tago okaze de la jarsxangxo 2003/04, klakitaj dum nia lastsabata Verda Kafo – POA. – La speciala zeljajxo, alportita de sxi, ege-ege bongusta konfitajxo, certe restos en la memoro de chiuj ni, gxis la venonta Z-festo.

Chu CIGNO-KANTO?

Entombapiedulo zorgas pri esperantigado post sia morto. Jen rima sugesto por sxtonplato metota sur mian lastan logxejon: Chi animo bestoama pluvivas.-- Finigxu kobaja torturado! – Animala vekricho korsxiras – Same kiel homa sxtonumado.

<<Prifajloj bonvenas.>>